



VIZITINDAJ

- Burgo de Ljubljano • Triobla ponto • Bazaro Plečnik • Draka ponto • Nacia kaj universitata biblioteko • Muzea kvartalo • Strato Miklošičeva cesta • Parko Tivoli • Kastelo Fužine • Marčo de Ljubljano

SPERTU

- Esploru la plej malnovajn arkeologiajn restaĵojn de la urba pasinteco, la heredaĵojn de Romia Emona.
- Vizitu la drakojn sur la Draka ponto kaj faru memfoton kun ili.
- Remu pagaje laŭlonge de la rivero Ljubljanica.
- Veturu per la mediafabla trajneto Urban.
- Malvarmiĝu en ombro de la plantoj el unu inter la plej malnovaj botanikaj ĝardenoj en Eŭropo.
- Partoprenu laboratorion en la bestoĝardeno.
- Amuziĝu en malliberejo, hodiaŭ aliigita en klubojn kaj trinkejojn ĉe la strato Metelkova.
- Partoprenu la maratonon de Ljubljano.
- Regalu vin per porcio da ranaj kruroj kaj glaso da metia biero.

SENTU VIN KIEL PROPRAHEJME

- Luu biciklon de la sistemo Bicikelj kaj esploru diversajn partojn de Ljubljano.
- Malstreĉe promenu tra Parko Tivoli kaj suprengrimpu la montetojn Rožnik kaj Šmarna gora.
- Aĉetu lokajn produktaĵojn aŭ regalu vin per manĝeto ĉe la Bazaro Plečnik.
- Trinku kafon en unu el la multaj gastejoj laŭ la bordoj de Ljubljanica.
- Spektu sportan aŭ kulturalan eventon.
- Vizitu komercan centron BTC, urbeton ene de la urbo.
- Revenu al Ljubljano en decembro. Varme vestita, sekvu la paradon de Avo Frosto kaj aŭskultu subĉielan koncerton kun glaso da varma spicvino aŭ medo.



LJUBLJANO MALSTREĈIGAS KAJ INSPIRAS

La rekonebla ĉarma panoramo vicigas Ljubljanon inter la plej belaj urboj en Eŭropo. La pitoreska arkitekturo plivaloriĝas pro multaj verdaj areoj kaj la rivero Ljubljanica, laŭlonge de kiu diversaj trinkejoj kaj restoracioj kontentigas ĉiun guston per sia riĉa oferto. La urbocentro estas viglita ankaŭ per diversaj eventoj tutjare. Kvankam Ljubljano estas moderna ĉefurbo je rapida viva ritmo kaj maljuna animo, ĝi havas malstreĉan, inspiran kaj junecan efikon. Danke al siaj varia oferto kaj viglaj eventoj, ĝi estas celloko en ĉiu tago de la jaro. En Ljubljano, la nekuraceblaj romantikuloj kaj pasiaj amantoj de kulturo kaj arto, senlacaj serĉantoj de kuirartaj specialaĵoj, fervoraj sportaj kaj distriĝemaj entuziasmluloj kaj fervoraj aventuruloj sentos sin bonege.



LA LEGENDO PRI LA EKESTO DE LJUBLJANO

Laŭ legendo, kiel fondinto de Ljubljano estas konsiderita la mita greka heroo Jasono, kiu ŝtelis la oran ŝafelon de kolhida reĝo Eeto, kaj poste fuĝis kun siaj kunuloj sur la ŝipo Argo trans la Nigra Maro, laŭ la riveroj Danubo kaj Sava, ĝis la fonto de Ljubljanica. Tie, la argonaŭtoj malmuntis la ŝipon, portis ĝin al la Adriatika maro, rekonmetis ĝin kaj revenis al Grekio. Eĉ antaŭ ol Jasono kaj la argonaŭtoj veturu al la fonto de Ljubljanica, ili trovis grandajn lagon kaj marĉojn apud ĝi. Tie Jasono renkontis teruran monstiron, batalis kontraŭ ĝi kaj mortigis ĝin. Ĉi tiu monstro estis la drako de Ljubljano, kiu hodiaŭ situas ĉe la supra de la burga turo en la blazono de Ljubljano kaj ankaŭ sur la Draka ponto.



VERDA URBO DE KULTURO KAJ KUIRARTO

Ljubljano estas agrabla kaj vigla urbo, konata ĉefe pro sia kultura kaj arta oferto, diversaj kuirartaj specialaĵoj kaj klopodoj por daŭripova disvolviĝo, kiel pruvas multaj verdaj areoj kaj bonaj vivkondiĉoj. Ljubljano tiel gajnis la neoficialan titolon de urbo konforma al bezonoj kaj necesoj de la homo, kaj la oficialan titolon Verda Ĉefurbo de Eŭropo en 2016. En 2018, la Eŭropa Komisiono deklaris Ljubljanon la plej avangarda en la kampo de daŭripova disvolviĝo, kaj en 2019 en la kampo de ciferecigo.



LJUBLJANO DE ARKITEKTO JOŽE PLEČNIK

La verkoj de la escepta arkitekto Jože Plečnik videblas ĉiuloke. Per aŭdacaj urbaj intervenoj kaj esceptaj arkitekturaj verkoj, li transformis la urbon en fandiĝantan artaĵon. Tion spegulas ĉefe la urbocentro, kie admiron vekas la Triobla ponto, la ĉefa bazaro kaj la Nacia kaj universitata biblioteko, dum apartan atenton meritas aliaj elstaraj artaĵoj de Plečnik, kiel la adiaŭa komplekso de la tombejo Žale, la preĝejo Sankta Francisko el Asizo aŭ la preĝejo Sankta Mikaelo ĉe Marĉo.



ĈIUTAGE IO OKAZAS EN LJUBLJANO

Kulturo, arto, tradicio, kuirarto kaj sportoj estas la ĉefaj temoj de la pli ol 14 mil eventoj, kiujn la urbo aranĝas ĉiutage, el kiuj almenaŭ 1 000 estas ekstere. Ĉio komenciĝas kaj finiĝas per festa foiro kaj aliaj eventoj, per kiuj la loĝantoj de Ljubljano finas la malnovan kaj eniras la novan jaron, dum kelkaj festivaloj okazas tutjare. Inter la plej popularaj estas: Ljubljana Festivalo, Jaza Festivalo, Junio en Ljubljano, Somero en malnova Ljubljano, Festivalo de surstrata teatro Ana Desetnica, Grafikarta bienalo, kiu estas unu el la plej tradiciaj tiaspecaj festivaloj en la mondo, kaj Internacia Filmo-Festivalo Liffe. La buntan oferton de festivaloj dum la jaro kompletigas Cankarjev domo, la plej grava slovena kultura kaj kongresa centro, Opera kaj baleta domo, kaj multnombraj teatroj.



VIZITI MUZEOJN KAJ GALERIOJN

Ljubljanaj muzeoj konservas la plej gravajn atestojn pri homa kreemo kaj teknologia progreso. Ne maltrafu viziton al la plej malnova muzikilo de la mondo, la 60 000-jara neandertala fluto en la Nacia muzeo kaj la plej malnova 5 200-jara ligna rado kun akso en la Urba muzeo. La Nacia galerio pleje fascinas per la riĉa kolekto de slovenaj impresionistoj, dum la Moderna galerio ravas per la plej elstaraj aŭtoroj de la 20-a jarcento. Dum la esplorado de la riĉa historio kaj arta heredaĵo vizitu ankaŭ la muzean komplekson sur la strato Metelkova.



EN LJUBLJANO ONI KUIRAS NUR FRANDAĴOJN

Ljubljano distingiĝas per riĉa kuirarta oferto. Trovu restoraciojn kaj gastejojn kun la ŝildo Gustoj de Ljubljano (Okusi Ljubljane) kaj malkovru la diversajn pladojn, kiuj formis la gustojn de ljubljananoj kaj iliaj gastejoj dum jarcentoj. La pladojn kompletigas bona elekto de slovenaj vinoj kaj metiaj bieroj.

Speciala trajto de la kulinara sceno de Ljubljana estas la ĉefa bazaro, kiu, krom oferti lokajn produktaĵojn, allogas pro la Malferma Kuirejo, populara evento, en kiu partoprenas gustumistoj ĉiun vendredon de printempo ĝis aŭtuno. Ĝi prezentas diversajn liverantojn de Ljubljana kaj de la ĉirkaŭa regiono.

URBAJ RONDIRADOJ

Por unuopaj gastejoj oni organizas regulajn urbajn rondiradojn por ekkoni plurajn vidindaĵojn: de vizito de la malnova urbo, inkluzive de la burgo de Ljubljano, al ekskurzoj per boato sur la rivero Ljubljanica, de kie la vido de la urbo estas tute alia. Eblas biciklaj veturadoj, kuirartaj itineroj, vinaj kaj bieraj gustumadoj ĝis ĉiĉeronado de Lipharulo kun vizito de vizia ĉambro de Arkitekto, trinkejo de Verkisto kaj galerio de Pentristo, kio konatigos vin kun la sekretoj de Ljubljano. Pliaj informoj ĉe: www.visitljubljana.com.

Grupoj kaj ankaŭ individuoj povas mendi ekskursojn kun rajtigataj ĉiĉeronoj ĉe: guidetours@visitljubljana.si



EKKONU LA ĈIRKAŬAJN LOKOJN

La unika geografia pozicio ebligas al ĉiuj, tiel al ljubljananoj kiel al vizitantoj, havi la mondon sur la manpolmo: la transiro al aliaj lokoj aŭ landoj estas rapida kaj pitoreska. Ljubljano estas bonega deirpunkto por novaj kaj malsamaj spertoj.

GUSTUMU LA KASTELAN VIVON

Trinku teon kun grafo Rikardo Blagaj en la kastelo Polhov Gradec; la kastelon Bogenšperk, unu el la plej belaj slovenaj kasteloj, esploru kun baronino Anna Maksimiliana Valvasor.

SPIRU LA NATURON

La regiona naturparko Ljubljana marĉo estas bunta ebenajo de herbejoj kaj kampoj kiujn superstaras malaltaj montetoj kun preĝejoj. La idilia pejzaĝo ĉe la ĉirkaŭaĵoj de Ljubljano taŭgas por biciklado kaj promenado. Ankaŭ observantoj de birdoj kaj aliaj bestoj entuziasmiĝas pri ĝi

LA PLEJ VIZITATA BOTANIKA PARKO EN SLOVENIO

Amantoj de faŭno kaj flaŭro certe ĝuos la buntajn kolorojn en Arboretum Volčji potok.

SOMERA PARKO KRVAVEC

Ĝi proponas diversajn agadojn, ekzemple mont-go-kartojn, -skoterojn kaj-biciklojn, kaj poste komenciĝas fabelaj aventurovojaĝoj de paŝtistaj nanaĵoj, kiuj tiklos vian fantazion.

ALIĜU AL LA PAŬTISTOJ

Grimpu la monton Velika planina kaj ekkonu la tradician kulturon de paŝtistoj. Trarigardu iliajn bienetojn kaj provu ilian manĝeton – la fagopiran farunaĵon kun acida lakto.



VIVA. VIGLA.

LJUBLJANA

ESPLORU ĜIN PER TURISMA KARTO URBANA

- VIZITANTE 20+ VIDINDAĴOJN
- VIZITO DE LA BURGO DE LJUBLJANO
 - GVIDATA URBA VIZITO
 - BOATVETURO
- VIZITO DE VARMOBANEJO SNOVIK



TURISMAJ INFORMOJ

TURISMA INFORMOCENTRO LJUBLJANO – TIC

Adamič-Lundrovo nabrežje 2, +386 1 306 12 15, tic@visitljubljana.si
 Labortempo:

- * de la 1a de junio ĝis la 30a de septembro, ĉiutage de 8:00 ĝis 21:00
- * de la 1a de oktobro ĝis la 31a de majo, ĉiutage de 8:00 ĝis 19:00



Eldonis: Turizem Ljubljana, Krekov trg 10, 1000 Ljubljana,
 tel. +386 1 306 45 83, info@visitljubljana.si, www.visitljubljana.com

Fotoj: B. Pogačnik, A. Tarfila, D. Wedam, NeaCulpa, M. Kastelic, A. Frelih, K. Kodba, M. Kambič,
 M. Kostanjšek, J. Gantar, A. Pogačar, D. Kordič.

Fasonado: Studio DTS, marto 2022

MEDI PROTEKTA TRANSPORTO



URBAN - ELEKTRA TRAJNETO

En unika kaj ekologia maniero, la elektra trajneto, nomata Urban, kondukas vin tra la urbo. Vi partoprenos allogan cirklan turisman vojon, kiu ligas la ĉefajn vidindaĵojn de la urbo. Deirpunkto: Urbodomo / Stritarjeva ulica

BICIKELJ

La bicikla luosistemo Bicike(LU) inkluzivas pli ol 60 aŭtomatajn bicikloluajn staciojn en la pilargita areo de la centro de Ljubljano. Bicikloj taŭgas precipe por mallongaj veturoj, ĉar la unua horo de luo estas senpaga. Semajna aŭ ĉiujara uzo de la sistemo eblas per ensaluto pere de la reĵeto de la luosistemo. Oni bezonas ankaŭ karton Urbana por la ĉiujara uzo. www.bicikelj.si

LJUBLJANA BICIKLO

La Ljubljana biciklo estas projekto de la Instituto Turismo Ljubljana, ene de kiu vi povas lui biciklon de la Slovena Turisma Informocentro por du aŭ pli da horoj de aprilo ĝis la fino de oktobro.



LJUBLJANA KAVALIRO

Vi povas mallongigi la piediradon tra la urbocentro per Kavaliro, malgranda elektra veturilo, kiu veturas senpage sur piediraj areoj. Funkcias tri veturiloj somere kaj du fermitaj kavaliroj vintre. Labortempo: ĉiutage de 6:00 ĝis 22:00. tel: +386 31 666 331 aŭ +386 31 666 332.

KLARIGO


- 1 Vidindaĵoj
- 2 Muzeoj kaj galerioj
- WC Necesejoj
- Trinkkranoj
- Boatohaltejoj
- 48 Trajneto Urban- deirpunkto
- Daŭro de irado ekde la Triobla ponto

VIDINDAĴOJ

- 1 Burgo de Ljubljano
- 2 Preĝejo de la Dianconco- Franciskana kirko
- 3 Triobla ponto
- 4 Placo Prešeren
- 5 Urbodomo
- 6 Bazaro
- 7 Katedralo Sankta Nikolao
- 8 Draka ponto
- 9 Buĉista ponto
- 10 Kongresa placo
- 11 Ŝuista ponto
- 12 Nubskrapulo
- 13 Križanke
- 14 Ursulanina kirko
- 15 Preĝejo Sankta Jakobo
- 16 Placo de la respubliko
- 17 Parlamento
- 18 Strato Mikloŝičeva (konstruaĵoj el secesia stilo)
- 19 Arkeologia parko- Romia Emona
- 20 Nacia kaj universitata biblioteko
- 21 Universitato
- 22 Slovena filharmonio
- 23 Cankarjev dom- kultura kaj kongresa centro

MUZEOJ KAJ GALERIOJ

- 1 Urba muzeo de Ljubljano
- 2 Urba galerio de Ljubljano
- 3 Galerio Jakopič
- 4 Internacia centro de grafikaj artoj
- 5 La domo de Plečnik
- 6 Nacia muzeo kaj Muzeo pri natura historio
- 7 Nacia galerio
- 8 Moderna galerio
- 9 Muzeo pri lastatempa historio de Slovenio
- 10 Muzeo de arkitekturo kaj dezajno
- 11 Slovena etnografia muzeo
- 12 Nacia muzeo – strato Metelkova
- 13 Muzeo pri nuntempa arto – strato Metelkova



MALKOVRU LJUBLJANON



visitljubljana.com

VIBRANT. VIVID. #VISITLJUBLJANA